Novjorka Prismo

Numero 106 · Septembro 2001

*La Esperanto-Societo de Novjorko*
*kore invitas vin al sia septembra kunveno*

DATO: Vendredon, la 21-an de septembro 2001, 6:30 ptm

LOKO: United Federation of Teachers
260 Park Avenue South (20th/21st Streets), NYC
(check schedule in lobby for room number)


PROGRAMO: 6:30 – Babilado kaj refreŝigaĵoj

7:00 – Rochelle F. Grossman, Tomaso Leong, kaj Alex Karkovsky prelegos pri siaj someraj vojaĝoj kaj pri La 86-a Universala Kongreso de Esperanto en Zagreb, Kroatio ★

## Katastrofo ĉe la World Trade Center

La 11-an de septembro du rabokaptitaj aviadiloj frapis la du famajn turojn de la Tutmonda Komerca Centro (the World Trade Center). Verŝajne miloj da homoj mortis dum la turoj falis post horo de brulado. La Esperanto-Societo de Novjorko kaj *Novjorka Prismo* funebras la perdon de tiom da vivoj, kvankam ĝis nun ni ne konas iun ajn esperantiston, kiu perdis sian vivon aŭ parencon, kaj nur malmultajn, kiuj perdis konatulojn. Ni dankas al ĉiuj homoj, tra nia lando kaj tra la tuta mondo, kiuj kontaktis niajn membrojn kaj sendis al nia klubo mesaĝojn, kaj ni certe sentos la mankon de tiuj du simboloj de la Granda Pomo. ★

– *Thomas ECCARDT*



FOTOS: W. LIMA, JULIO 2001



FOTOS: T. ECCARDT, SEPTEMBRO 2001



*Memor-afiŝo pri WTC ĉe la Brooklyn Promenade.*



*Floroj, kandeloj, fotoj, kaj notoj, memore al viktimoj de la katastrofo ĉe WTC, dum Memora Maldormo en la parko Union Square ĉe 14-a strato en Novjorko.*



*Mur-pentraĵo en Loisaida, fare de Chico, fama loka artisto.*

# Someraj renkontiĝoj kaj eventoj

## Nia somera pikniko en Stuyvesant Town

La 16-an de junio, Stuyvesant Town la unuan fojon malfermis sian ovalan parketon al la publiko, kaj ESNY profitis de la okazo. Pli malpli dek esperantistoj ĉeestis nian jaran piknikon. Je la 2-a horo postagmeze, oni prezentis koncerton de usona muziko kaj prezidento Theodore Roosevelt mirakle aperis, kaj eĉ parolis kun ni. Aŭ eble ne estis la vera prezidento, sed homo vestita kiel li. Kiu scias? ★

*– Thomas ECCARDT*






## Ĝardenoj de Unuiĝintaj Nacioj

Multaj esperantistoj vizitis U.N. je la unua de julio. Iris grupo de brazilanoj inkluzive instruistojn kaj geknabojn, krom gasto el Parizo.

Post manĝi en la restoracio tie, Rochelle F. Grossman gvidis la grupon tra la belaj konstruaĵoj de tiu internacia paca organizo. ★

*– Thomas ECCARDT*




*Brazilanoj ĉe UEA, antaŭ vizito al la ĝardenoj.*

## Ĉina Klerula Ĝardeno

Kvin esperantistoj vizitis la Chinese Scholar's Garden ĉe la botanika ĝardeno de Staten Island je la 5-a de aŭgusto. Oni asignis al ni gvidantinon, kiu klarigis la signifon de ĉiuj floroj, plantoj, kaj arkitekturaĵoj. ★

*– Thomas ECCARDT*



## Ballet Tech

Merkredon, la 24-an de julio, ses esperantistoj babiladis kaj poste ĉeestis prezentadon de dancado ĉe la Tutmonda Financa Centro. La dancado estis tre interesa kaj sufiĉe originala, ekzemple, oni uzis grandegan tukon por reprezenti marajn ondojn. Bedaŭrinde, la spektantaro estis tiom granda, ke ne ĉiuj el nia grupo trovis unu la alian. ★

*– Thomas ECCARDT*

## Sud-Strata Marhaveno

La 17-an de aŭgusto 8 personoj – ESNY-anoj kaj gasto el San-Francisko – pasigis agrablan vesperon, la antaŭlastan someran renkontiĝon, ĉe la Sud-Strata Marhaveno (South Street Seaport). En tiu turisma etoso, kompreneble la ĉeestantoj fariĝis kiel turistoj, nome rigardadis flankspektaklojn laŭ la trotuaro, intermiksiĝis kun turistoj, kaj vespermanĝis antaŭ la spektakla nokta panoramo de la haveno. ★

*– Tomaso LEONG*



*Samideanoj ĉe la Sud-Strata Marhaveno.*

## Fort Tryon Parko

La kafejo estis fermata por farbado, tamen kvin ESNY klubanoj kaj pli malpli ok junaj JES-anoj renkontiĝis ekstere en Fort Tryon Park la 2-an de septembro. Post longa interkona parolado ni iris al interesa latin-amerika restoracio kaj manĝis kubajn sandviĉojn inter aliaj manĝaĵoj. ★

*– Thomas ECCARDT*

## Internacia Tago de la Indiĝenaj Popoloj de la Mondo

La 9-an de aŭgusto mi ĉeestis ceremonion ĉe UN omaĝe al la Internacia Tago. Ankaŭ ĉeestis konata esperantisto Yoŝimi Umeda de la Internacia Ŝinto-Fonduso. Gillian Sorensen, Asista Ĝenerala Sekretario pri Eksteraj Rilatoj, legis mesaĝon de Ĝenerala Sekretario de UN, Kofi Annan. Julian Burger, de la Oficejo de la Alt-Komisiito pri Homaj Rajtoj en Ĝenevo, legis mesaĝon de Mary Robinson, Alt-Komisiito pri Homaj Rajtoj. D-ro Arvol Looking Horse (Lakota) prezentis la tradician ceremonion de la sakra pipo. La Mohawk kantistoj kaj dancistoj de Novjorko kaj Kanado prezentis belan programon. Luis Delgado Hurtado (Peruo) benis la programon laŭ la inkaa tradicio. Kondukis la programon Roberto Mucaro Borrero (Taino).

Indigenous People

INTERNATIONAL DECADE OF THE WORLD'S INDIGENOUS PEOPLE 1995-2004

Posttagmeze kaj venonttage, la 10-an de aŭgusto, okazis diversaj interesaj diskutoj pri la nova Permanent Forum on Indigenous Issues, starigita de la Ekonomia kaj Socia Konsilio (Ekosok) de UN laŭ rezolucio 2000/22, adoptita la 28-an de julio 2000. ★

*– Rochelle F. GROSSMAN*

## Laste vizitis . . .

### . . . el Parizo

Frederic MISAMEGBE, el Parizo, alvenis Novjorkon je la fino de junio. Li restis ĉe mi, kaj ĉe Daniel Cuthbert dum pli malpli tri semajnoj. ★

*– Thomas ECCARDT*



*Frederic Misamegbe ripozas dum konversacia rondo en Bryant Park dum junio.*

### . . . el Pensylvania

La 15-an de aŭgusto, Chuck Smith, el Harrisburg, PA, tranoktis ĉe ni survoje al junulara kunveno en San-Francisko. Mi vespermanĝis en korea restoracio kun Chuck, kiu lastatempe diplomiĝis ĉe Messiah College, en Pennsylvania, kaj baldaŭ komencos laboron kiel komputilisto. Chuck revizitis nin survoje hejmen, kaj poste partoprenis en alia junulara kongreseto en Novjorko je la komenco de septembro ★

*– Jim MEDRANO*



*Chuck Smith kun fama samideano.*

## JES kongreseto en Novjorko

Dum la semajnfino inter aŭgusto kaj septembro, pli ol dek junaj esperantistoj renkontiĝis en Novjorko. Oni komencis vendredon ĉe la kafejo Esperanto en MacDougal strato. Sabaton, oni renkontiĝis en Bryant Park. Dimanĉe, la grupo kaj nia klubo kuniĝis en Fort Tryon Parko. ★

*– Thomas ECCARDT*







*ESNY-anoj kaj junularaj kongresanoj en Fort Tryon Park.*



*Chuck, Susan, Maki, kaj aliaj ĉe la Esperanto Café.*

# Anoncoj

## Novjorko estos librolando!




*New York is Book Country 2001* okazos la 23-an de septembro 2001 kaj ankoraŭfoje ESNY estos tie. Por varbi la Internacian Lingvon, ni starigos Esperanto-tablon iom sude de la libro-foiro proksimume je la 47-a strato je la 11-a horo matene. Se vi ŝatus volontuli posteni la tablon, bonvolu informi min ĉe la septembra kunveno, aŭ telefoni min ĉe 212-477-6516. ★

– *Thomas ECCARDT*

## Ĝis, Lillian!

Ĉu vi scias, ke nia samideano Lillian Rachele translokiĝas al Oregono? Jes, nia kara Lillian iras al la alia flanko de la kontinento por esti pli proksima al siaj gefiloj.

Lillian estas membro de ESNY jam de longe (pli longe ol mi), kaj ŝi malavare servis nian klubon kiel kasistino dum jaroj. Antaŭnelonge, ŝi donacis revuojn al nia oficejo. Ankaŭ Esperanto-scrabble ludojn.




Lillian estas mallaŭta, sed sen homoj kiel ŝi, la movado malaperus. Do mi esperas, ke ŝi trovos manieron resti Esperante aktiva en sia nova ŝtato. Kaj mi certas, ke la tuta klubo deziras al ŝi la plej bonan ŝancon kaj feliĉecon en Oregono. Ĝis la revido, Lillian! ★

– *Thomas ECCARDT*

## Learn Esperanto

Would you like to learn a language, but don't have a lot of time? Learn Esperanto in our free course at Stuyvesant Adult Center, 345 East 15th St. No registration is necessary, just bring $5 for the book. Come to room 411 on Tuesday, October 23 at 7:30 p.m. and learn the world's most successful invented language. The Tuesday classes are 1½ hours long and continue through November 11. ★



– *Thomas ECCARDT*

## Okemo 2001




La 8-a Internacia Semajnfino Esperantista okazos denove en Okemo, Vermont. La renkontiĝo komenciĝos je la 14-a horo sabaton, la 6-an de oktobro kaj finiĝos je tagmezo lundon, la 8-an de oktobro. Dum pasintaj jaroj, multaj el niaj lokaj samideanoj faris la vojaĝon al Okemo kaj ĝuis ne nur la renkontiĝon mem sed ankaŭ la aŭtuniĝon de la montaraj arboj. La Semajnfino Esperantista estas organizata pere de la Esperanto-Societo Kebekia lige kun aliaj esperantistaj asocioj en Usono. Por pli da detaloj, iru al la TTT paĝo: *http://www3.sympatico.ca/esperanto/eo-okemo.htm*. Se vi ne kapablas akiri la informon interrete, telefonu al mi ĉe 212-982-5029 – mi presos ĝin por vi kaj sendos ĝin poŝte – aŭ venu al nia septembra kunveno. ★

– *Nancee MEDRANO*

## Societa Kalendaro

Venu al niaj venontaj renkontiĝoj! Metu tiujn datojn en vian kalendaron.

**Septembro — 21**

**ESNY Kunveno**
Rochelle F. Grossman, Tomaso Leong, kaj Alex Karkovsky raportos pri siaj someraj vojaĝoj kaj pri la 86-a UK en Zagreb, Kroatio
*Vendredon, 6:30 ptm ĉe UFT*

**Oktobro — 7**

**Tagmanĝo**
*Dimanĉon, 1:00 ptm ĉe SONY Plaza*

**19**

**ESNY Kunveno**
*Vendredon, 6:30 ptm ĉe UFT*

**23**

**Free Esperanto classes begin at the Stuyvesant Adult Center**
*Tuesdays, 7:30-9:00 pm, for 7 weeks*

**United Federation of Teachers (UFT)**
260 Park Avenue South, NYC (20th/21st Streets)
(check schedule in lobby for room number)

**SONY Plaza Atrium**
Madison Avenue (55th/56th Streets) NYC
Street level, in the Atrium

**Stuyvesant Adult Education Center**
345 East 15th Street (1st/2nd Avenues) NYC
Fourth floor, room 411

## Letero de Rosa Helfgot

Dear Ms. Soskina:

Out of respect to the memory of my husband, Salomon Helfgot, a long-time member of your Society, I am renewing my subscription today . . . Best regards to our good friends. ★

*Sincerely,*
*Rosa P. R. Helfgot*



ESPERANTO-SOCIETO DE NOVJORKO
c/o UEA, 777 UN Plaza, NY, NY 10017 (212) 687-7041

| Prezidanto | Korespondа Sekretariino | Protokolisto |
|---|---|---|
| Thomas Eccardt (212) 477-6516 | Rochelle F. Grossman (718) 457-1490 | Stuart Green (631) 751-5683 |
| **Vicprezidanto** | **Kasistino** | **Program-Direktorino** |
| Thomas Leong (718) 981-4252 | Sofiya Soskina (718) 671-5699 | Susan Kohn (212) 226-0443 |


**Novjorka Prismo**
Numero 106 – Septembro 2001
ISSN: 1059-5627
http://members.aol.com/novjorka/prismo

| Redaktoro | Subredaktoroj | Desegnistino |
|---|---|---|
| Jim Medrano (212) 982-5029 | Thomas Eccardt, Nancee Medrano | Mary Pulley |

Sendu kontribuaĵojn al:
Jim Medrano, 400 East 20th Street #1B, New York, NY 10009-8103
e-poŝto: jimmedrano@mac.com
© 2001 Esperanto Society of New York